Starto

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1971 1

# SUR LA SOJLO DE LA NOVJARO

Ĉiu nova jaro igas la homon rerigardi sian faritan laboron kaj plani la farotan. Ankaŭ ni eluzu tiun ĉi okazon.

Jam somere en Opava mi prave substrekis en mia raporto, ke ni povas konstati daŭran kreskon de nia membronombro kaj ke espereble ni atingos la planitan ciferon de 2000 ĝis la jarfino. Kia estas la fakto, bv. legi aliloke. La diversaj eldonaĵoj /flugfolio jam en IIa eldono po 20 000 pecoj, insignoj, "Apokrifoj", "Paŝoj al plena posedo" ktp./ ankaŭ montras nian persistemon kaj tiurilate ne malgravan sukceson.

La apogo de la Kulturministerio en la afero de nia aniĝo en UEA estas granda atingo kaj nia asocio de nun havas du UEA-komitatanojn. Kontentige kreskas ankaŭ la kunlaboro kun niaj najbaraj asocioj kaj perspektive ni antaŭvidas interŝanĝon de delegitaroj, kiel ni skizis dum la brila IIa kulturfestivalo en Opava. Sukcese laboris pluraj niaj sekcioj kaj ankaŭ diversaj niaj grupoj, kiuj dum siaj regionaj aranĝoj ebligis pli profunde konatiĝi gesamideanojn kun la celoj de nialanda movado.

Sen eduko de juna generacio ni povus antaŭvidi neniun sukceson. Tial niaj someraj tendaroj, precipe la tradicia SET en Lančov, modele zorgas jam de jaroj pri faka eduko. Ĉiujare eksterlandaj observantoj envias ne nur la entuziasmon de nia junularo, sed ankaŭ la relative ĝeneralan perfektecon de tiu ĉi grandstila aranĝo. Nia celo renovigi la kolegion en Doksy en 1972 por pliaĝuloj estos plua paŝo al bezonata tiurilata specialiĝo.

Malkontentaj ni estis pasintjare i.a. en la sfero de publika informado, kaj kvankam ni provis ne unufoje veni en daŭran kontakton kun ČTK, TV kaj la Radio, niaj sukcesoj estis minimumaj. Ni ankaŭ ne sukcesis efektivigi niajn intencojn pri J.A. Komenský tiagrade, kiel ni planis kaj kiel meritus tiu ĉi monda grandulo.

Nian movadon forte tuŝis ankaŭ la forpaso de pluraj niaj karaj homoj, inter ili de nia karmemora honora membro Julie Šupichová unuavice.

Ĉe la enpaŝo en nian novan administran jaron ni tuj diru, ke en nia movado respeguliĝu precipe plena subteno al nia ŝtata penado pri socialisma kunvivo kaj interhoma paco. Same ĉiuj gravaj jubileoj, inter ili 50 jaroj de KPĈ, okupu honestan lokon en niaj laborplanoj kaj programoj.

Pluraj, tre gravaj entreprenoj atendas nin en la kuranta jaro. Nia asocia organo sen granda fanfaronado volas pliperfektiĝi kaj

/Daŭrigo sur la 4-a pg./



# Forpasis Julie Šupichová

Instruistino kara,
da semoj dekmilojn ekplantis
man'via malavara.
Por eta virino gigantis
mirinda verk'elstara
kaj la sindon'multjara
je glor-monumento sin fandis

/El la poemo de Jiří Kořínek/

Post mallonga malsano mortis en Praha la 20an de decembro 1970 Julie Šupichová /nask.27.1.1884/,instruistino kaj esperantistino depost la jaro 1907,honora membrino de UEA,EAĈSR,ĈEA.

Jam antaŭ la unua mondmilito komenciĝis ŝia agado en la Unua Sinjorina Ĉeĥa Societo Esperantista kaj Bohema Asocio Esperantista. En 1921 ŝi sekretariis la 13an Universalan Kongreson de Esperanto en Praha.En 1923 estis nomita sekretariino de la Ĉs. Esperanto-Instituto. Membrino de Lingva Komitato de 1925.

Daŭran meriton ŝi akiris per sia aktiveco literatura,kunlaborante al sesdeko da ĉeĥaj kaj Esperantaj gazetoj,kaj verkinte 26 publikaĵojn.

Kun Julie Šupichová foriras unu el la plej elstaraj pioniroj kaj personecoj de la ĉeĥa kaj internacia Esperanto-movado.

---

La prezidanto de ĈEA Josef Vítek ricevis okaze de la forpaso de J.Šupichová kondolencan leteron de UEA,el kiu ni citas :

> Permesu al mi aldoni mian esprimon de kondolenco al la ĉeĥoslovaka esperantistaro en la nomo de la Centra Oficejo okaze de la forpaso de Julie Šupichová. La amplekso de ŝia verkaro dum la jardekoj estis tia,ke oni necese sentas por ŝi grandan respekton kaj admiron,eĉ tute ne konante ŝian personon.
>
> Victor Sadler,Direktoro,C.O,pm

## REMEMORE AL GRANDA ESPERANTISTINO

Doloriga sciigo atingis min fine de la pasinta jaro:Julie Šupichová mortis.Kvankam ni de tempo al tempo interŝanĝis amikajn leterojn,tamen mi neniam vidis ŝin persone kaj eĉ ŝian foton mi vidis la unuan fojon antaŭ nur kelkaj monatoj. Linioj de ŝiaj leteroj alparolis min ĉiam per iam jam aŭdita melodio.Sed en realo mi aŭdis ŝian voĉon la unuan kaj lastan fojon pasintan septembron, kiam radiostacio Praha intervjuis ŝin por la programo "Kaj jaroj pasas..."

Mi neniam renkontis iun alian homon,kun tiel senmezure senprofitema amo al Esperanto,kian havis dum sia tuta vivo s-anino Šupichová.Ekde sia esperantiĝo ŝi ekkomprenis,ke Esperanto estos senco de ŝia vivo. Iam ŝi skribis al mi : "Ĝuste pro mia kara Es-

/Daŭrigo sur la 7 -a pĝ./

## *Ze života kroužků*

BOR U TACHOVA - V rámci oslav Měsíce čs.-sovětského přátelství uspořádal EK 11.11.1970 veřejnou besedu o Sovětském svazu. O svých zážitcích z dovolené vyprávěl dr. Pradl, jenž svou přednášku doplnil barevnými diapozitivy. Pořad doplnila výstavka sovětských esperantských publikací. Ke spokojenosti 98 posluchačů přispělo i hezké prostředí a občerstvení připravené členy klubu.

Ve spolupráci s Okresní mírovou radou se 20.11. konal slavnostní večer k 300. výročí J.A. Komenského pod názvem "Komenský a mír". Tuto akci velmi kladně zhodnotili představitelé OMR i OVNF.

O setkání západočeských esperantistů v Klenčí, na něž přijelo 48 aktivistů z 9 míst a kde promluvil V.Echtner o vztahu mezi starou chodskou tradicí a dnešní prací esperantistů, informovala příznivě plzeňská "Pravda".

BRNO - KE uspořádal 19.12. koncert na počest 200. výročí narození L.van Beethovena. Program připravil a vedl prof. Scheiber, účinkovali H.Halířová, M.Smyčka, A.Jíra a J.Doležal.

Tisková služba rozesílá každý měsíc několik zpráv z hnutí na 9 místních redakcí; za loňský rok přinesl tisk na 40 informací. Zásluhu na tom má J. Vondroušek.

Vylepení asi 50 plakátů k 56. světovému kongresu v Londýně zařídí klub v červnu.

ČESKÁ TŘEBOVÁ - EK "Amikeco" organizoval v prosinci večer věnovaný životu a dílu L.L.Zamenhofa. Jako každým rokem i nyní se členové kroužku rozloučili se starým rokem na tradičním "Esperantském silvestru." Příležitostí k setkání esperantistů, ale i příznivců esperanta ze širokého okolí byl Druhý esperantský ples pořádaný 23. ledna.

DOMAŽLICE - Kroužek esperanta na zdejším gymnasiu vede prof. J. Kapic. Schůze navštěvuje 19 osob.

CHOCEŇ - Kurs esperanta pro začátečníky vede od října při Domě odborů J.Jiráský. Vedení EK se ujal Jan Kašpar.

JABLONEC NAD NISOU - U příležitosti 4. výročí vzniku EK se konalo tradiční setkání esperantistů 23. ledna v budově Kulturního a společenského střediska.

OPAVA - Opavští uspořádali 1. prosince besedu na téma "SSSR očima esperantisty" s promítáním barevných diapozitivů a poutavým výkladem ing. V.Hebdy.

Padesát esperantistů a příznivců hnutí přišlo 11.12. na Zamenhofův večer. Zhlédli výstavku děl tvůrce esperanta a korespondenci dětského kolektivu, který nejvíce přispěl k úspěchu akce.

Matice slezská v Opavě pokračuje ve vydávání souborů pohlednic s esperantským textem.

Konverzační kurs EK používá jako povinnou příručku učebnici W.Aulda "Paŝoj al plena posedo".

OSTRAVA - Městský dům pionýrů a mládeže v Ostravě II pořádá od 21. ledna tr. každý čtvrtek kurs esperanta pro žáky 3-9. tříd a pro studenty od 15 do 18 let.

PODĚBRADY - Nový výbor, který má všechny předpoklady pokračovat v další úspěšné činnosti, byl zvolen 10. prosince na večeru L. L.Zamenhofa za účasti 21 členů.

TÁBOR - Od 1. prosince mr. přesídlil EK do nové klubovny v Okresní čítárně, kde se schází pokaždé v pondělí. Svazové příspěvky na rok 1970 již zaplatilo všech 35 členů.

V listopadu a prosinci vykonal informativní přednášky o esperantu - za účasti 80 posluchačů průmyslové školy a Klubu turistů - ing. L.Krajíc. Současně začal kurs pro začátečníky na ekonomické škole.

TŘEBÍČ - Dva konverzační kur-

zy probíhají na pedagogické škole a v místní klubovně. Na předvánoční besídce EK promluvili k výročím L.Zamenhofa a J.Komenského J.Poláček a Th.Kilian.

Ještě v 1.čtvrtletí tr. vyjde opět učebnice ABC.

ÚSTÍ NAD LABEM - Pravidelné schůzky EK se konají každý čtvrtek. V lednu a únoru jsou na programu přednášky o vztahu Lenina a Komenského k problému mezinárodního jazyka.

## OSOBNÍ KRONIKA

Své abrahamoviny oslavil 6.12. 1970 známý esperantský básník a aktivista Karel P í č.

Během jednoho týdne opustili naše řady František T u ch/20.11/ a Josef M a t y k /27.11.1970/, oba dlouholetí členové EK v Hradci Králové.

## —— SEMINARIO EN TŘEBÍČ ——

Pedagogia sekcio de ĈEA aranĝas de la 12-a ĝis la 14-a de februaro 1971 pedagogian seminarion en Třebíč. Ĝi estos la unua oficiala plenkunsido de la sekci-membroj post la fonda kunveno en Brno, 1969. La programo de la seminario estas orientita precipe al la plej gravaj problemoj de la nuna lingvo-nivelo: funkciigo de la Lingva kaj Ekzamena Komisionoj, revizio de instruprogramo en SET, fakaj pedagogiaj kaj didaktikaj problemoj, organizaj problemoj de la sekcio, kiu atingis jam 110 membrojn, ktp.

Pri la rezultoj de la seminario ni informos en la venonta numero.

Interesatoj pri laboro de PS anonciĝu ĉe ĝia sekretario s-ano Karel Kraft, Obořiště 107, Příbram kaj petu senpagan informan cirkuleron de la sekcio!

## SUR LA SOJLO DE LA NOVJARO

/daŭrigo de la 1-a paĝo/

ankoraŭ pli ofte saluti niajn legantojn ol ĝis nun. La asocio celas atingi 2500 membrojn...la asocia aparato en maksimume du semajnoj respondi senreste ĉiujn dezirojn de siaj klientoj, la sekcioj surbaze de siaj renovigitaj statutoj pliprofundigi siajn respektivajn agadojn, inter ili pedagogia sekcio, fervojistoj kaj blinduloj ne perdante vane tempon jam ekmarŝis...

Eble la plej grava por nia movado estos "Vsetín 1971", sed nia laborkalendaro montras ankaŭ ceterajn ne sensignifajn aranĝojn, kiuj ĉiuj havas la saman celon : plidensigi niajn vicojn, ordigi harmonian kunlaboron kaj havi kontentan membraron en forta, bone funkcianta enlanda organizo. Ni, viaj komisiitoj, denove vin ĉiujn certigas pri nia plej bona volo. Tion dokumentis ankaŭ la partopreno de ĉiuj niaj komitatanoj en la traktadoj de la lasta plenkunsido en novembro.

Ni kune zorgu, ke ĉiu esperantisto per sia membreco aktive subtenu sian asocion, ke laŭ siaj fortoj li ankaŭ laboru en sia grupo, ke li estu modela homo de sia patrujo, ke li fiere portu la verdan stelon. Kunlabore kun niaj frataj slovakiaj esperantistoj kaj kun tiuj de la tutmondo ni strebu pri la pli bona socio !

Kaj fine : mil dankojn pro la tiom multaj sinceraj bondezirsalutoj okaze de la jarŝanĝo. Ili estas tre instigaj kaj esperdonaj. Plenkore ni deziras reciproke al vi ĉiuj sanon kaj plenumon de ĉiuj viaj planoj.

Josef V í t e k

---

Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj la redakcio de STARTO ricevis nombrajn bondezirojn por 1971. Al ĉiuj gratulintoj sinceran dankon !

## ĈU ĈEĤE AŬ „VERDE"?

Sub tiu ĉi titolo ni aperigis en la 5-a numero pasintjara la artikolon de s-ano K.Kraft. La temo - sendube aktuala - vekis atenton.Ni lasu do paroli la aliajn:

Ekzistas malnova ŝerco: A:Kio estas Esperanto? B:Universala lingvo. A:Kaj kie oni parolas ĝin? B:Nenie.

Ĉu la ŝerco troigas ? Ni diru sincere : Ne multe.Ni diskutas kaj diskutas /kompreneble nacilingve/,kiamaniere plej efike disvastigi la ideon de internacieco kaj paco,kiel realigi la revojn de nia laŭte adorata majstro Johano Amoso Komenio,sed kiam temas pri tio,malkaŝi nian simpation al tiuj ideoj,subite ia stranga honto nin obsedas,ia etburĝa spirit-mallarĝeco...

Ne timu, ne estas honto paroli lingvon tiel urĝe postulatan de nia fama "instruisto de popoloj".Male,vi povas fieri,ke vi tiun lingvon regas - se vi ĝin regas. Sed ne kredu,ke vi ĝin iam flue regos,se vi ĝin ne uzos. Da okazoj paroli kun eksterlandanoj estas ĉe ni tro malmulte. Se vi sekvus la konsilon de kelkaj malnovaj samideanoj "paroli kun ĉeĥoj ĉeĥe,kun alilandanoj Esperante", restus al vi verŝajne nenio alia,ol paroli kun ĉeĥoj ĉeĥe kaj kun alilandanoj per gestoj. Eĉ d-ro Ivo Lapenna parolas hejme principe internacilingve por ne perdi sian brilan fluecon kaj spritpretecon en Esperanto./Se vi suspektas,ke tiu ĉi aludo celas piki kelkajn niajn eminentulojn,kiuj preskaŭ ĝenerale rifuzas uzi Esperanton escepte sur oratora podio,do sciu,ke - vi pravas./

Cetere ni diru rekte,ke tiu stranga honto estas plejparte nur interna elturniĝo por kaŝi antaŭ si mem sian maldiligentecon. Mi ne kontestas,ke ankaŭ por mi estas pli komforte paroli ĉeĥe ol "verde".Sed mia amo al la internacia lingvo estas pli granda ol mia komfortemo. Kiamaniere vi volas kontesti la antaŭjuĝon,ke Esperanto ne estas taŭga por interkompreniĝo,se vi mem ĝin evitas uzi ĉe iu ajn okazo ?

Do,la ĝusta respondo al la demando,kie oni parolas Esperante, estu : En Esperantujo. Kaj kie estas Esperantujo ? Ĉie,kie du aŭ pluraj esperantistoj renkontiĝas.

Felix

Kie ni povas ekzerci la lingvon? Ĉu parolante al salikoj ie apud fiŝ-lageto? Ankaŭ por aliaj lingvoj oni havas nialande rondetojn kaj kiam oni parolas publike ruse,angle,france,ĉu oni iel kulpas?

Niaj organizaj organoj ofte sin turnas al ni per nacilingvaj tekstoj,kvankam al multaj el ni utilus scii aŭ kompreni necesajn terminojn en Esperanto. Mi do rekomendas tiakaze ĉiam uzadi dulingvajn tekstojn,kiuj servus al edukado de niaj kadroj,kiuj estas sen konvenaj vortaroj,sen necesa erudicio,sen ebloj de lingva kresko.

D-ro Černý

---

ĈEĤA STUDENTO PRELEGIS EN DIJON. La 16an de decembro esperantistoj kolektiĝis en la franca urbo Dijon,kie okaze de la Zamenhofa datreveno prelegis membro de ĈEA kaj studento de la konata Carnot-liceo Josef Vítek.

DISTINGOJN dediĉitajn de la aŭstria prezidento Jonas pro la sindona agado por Aŭstrujo pere de Esperanto ricevis 4 membroj de Aŭstria Esperantista Federacio.

ASOCIO DE GERMANAJ E-INSTRUISTOJ transdonis al Konstanta konferenco de la Kulturministroj memorandon pri la instruado de Esperanto.

# Okénko do sekretariátu

Předsednictvo ÚV ČES vyhlásilo odměny pro člena, který získá svazovou legitimaci s č. 2000 a pro EK, který jeho členství zprostředkuje. Knižní dar a bezplatné členství na 5 let získala Jiřina Vahalíková z Paskova a místní EK knižní dar a 5 kompletních ročníků časopisu Starto 1970 a 1971.

**POŘADÍ EK** podle počtu členů, kteří zaplatili členství za rok 1970 /stav k 31.12.1970/:
Praha-215, Paskov-101, Ostrava VŽKG-86, Třebíč-84, Brno PKO-76, Mělník-74, Vsetín-60, Č.Budějovice-42, Olomouc-42, Pardubice-41, Plzeň-34 Tábor-34, Č.Třebová-33, Třinec 33, Kopřivnice-31, Hr.Králové-28, Žďár n.S.-28, Ústí n.L.-27, Písek-25, Ostrava-Poruba-25, Opava-23, Jablonec n.N.-22, Hranice n.M.-21, Kolín-20, Liberec-20, Gottwaldov-19, Polička-19, Náchod-18, Poděbrady-18, Stonava-18, Litoměřice-17, Bor-16, Svitavy-16, Havířov-14, Havl.Brod-14, Hořice-14, Mor.Budějovice-13, Bučovice-12, Frýdek-Místek-12, Jihlava DK-12, Kyjov-12, Brno I.B.-11, Most-11, Příbor-11, Šumperk-11, Teplice-11, Znojmo SZTŠ-11, K.Vary-10, Ostrava žel.st.-10, Příbram-10, Turnov-10, Vyškov-10, Frýdlant-9, Hodonín-9, Kladno-9, Miletín-8, Přerov-8, Č.Třebová SPŠŽ-7, Lanškroun-7, Skuteč-7, Trutnov-7, Č.Lípa-6, Herbortice-6, H.Počáply-6, Choceň - 6, Králíky-6, N.Jičín-6, Ostrovn.O.-6, Semily-6, Žamberk-6, Boskovice-5, Jaroměř-5, Litomyšl-5, Louky n.O.-5, Městec Králové-5, Slavkov-5, Zásmuky-5. Celkem 1 825 platících členů svazu.

Srovnáme-li tento údaj s počtem vydaných legitimací /2030/, zjistíme, že 205 členů z roku 1969 své členství neobnovilo. Ani zdaleka nejsou ještě vyčerpány všechny možnosti při náboru nových členů. Uvedená čísla jsou u většiny EK daleko menší než skutečný počet členů.

**DARY NA EDIČNÍ FOND ČES /pokr./:** J.Rejman-5.-, E.Dudek-20.- Z. Marenčín-50.-, V.Havel-9.- /sa 12.400 Kčs/. Všem dárcům děkujeme a věříme, že letos se jejich řady rozrostou.

ČES byla od 1.ledna tr. přidělena poštovní schránka. Zasílejte proto veškerou korespondenci na adresu <u>Český esperantský svaz, p. schránka 8, Praha 2 !!!</u>

## S L O S O V A C Í L I S T I N A

Dne 16.12.1970 bylo za účasti státního notáře V.Hály provedeno vylosování knižních poukázek ČES. Celkem bylo prodáno 1 325 ks. Tažena byla tato čísla :

1.cena - tranzistorové rádio/pouk.č.1280/ - 2.cena - bezplatný pobyt v Lančově /č.511/ - 3.cena - vysoušeč vlasů /č.36/ -4.cena -dámský skládací deštník /č.303/- 5.cena - pánská aktovka /č.736/
6.-10.cena - gramodeska "Bonveno"- č.359,728,730,1 044,1 257 ;
11.-30. " - sada esp.odznaků - č. 28,31,62,141,177,325,377,444, 540,543,681,696,770,941,965,991,1023,1045,1111, 1216 ;
31.-50. " - esp. publikace a odznaky v ceně 10 Kčs dle výběru výherce : 39,48,64,147,164,224,332,412,484,654,687, 803,843,961,1060,1115,1146,1193,1246,291 ;
51.-100. " - esp.publikace a odznaky v ceně 5 Kčs dle vlastního výběru : 25,30,111,127,162,233,253,328,335,339,340 375,397,416,439,442,462,526,569,583,643,662, 673,

747,757,802,804,819,834,883,938,940,943,951,971,972, 1004,1056,1074,1086,1095,1096,1121,1140,1163, 1177, 1192,1227,1296,1315 ;

VÝHRY budeme rozesílat,příp.osobně předávat,ihned po předložení vylosované poukázky.

POUKÁZKY budeme vyměňovat do 31.března. Nepromněněné poukázky propadají po tomto datu ve prospěch svazu. U poukázek,které vyhrály 31.-50.cenu se jejich hodnota /10.-/ zvyšuje o dalších 10 Kčs a u 51.-100.ceny o 5 Kčs.

Postup při výměně poukázek :

1.Na zadní stranu poukázky napište zřetelně svoji adresu !

2.Poukázku zašlete na adresu svazu a přesně uveďte,za jaké publikace a odznaky ji chcete vyměnit.Objednávejte vždy za vyšší částku! Rozdíl doplatíte složenkou.Objednáte-li si méně,peníze nebudeme vracet ! Počítejte 2 Kčs na balení a poštovné.

3.Při výběru použijte NABÍDKU ČES,která byla rozesílána se Startem č. 5/1970.Za publikace,které nejsou v nabídce uvedeny, nemůžeme poukázky vyměňovat.Slevy nebudou při výměně poskytovány.

---

## Recenzo

VOĈO DE LITOVIO

Interesega kaj enhavriĉa publikaĵo atingis nian redakcion. Ĝi estas "Horizonto de Soveta Litovio",1-a kajero,eldonita de Litova Sekcio de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj en Vilnius 1970, formato A 4,32 pĝ.

La almanako entenas buntan kolekton da literaturaĵoj,prikulturaj skizoj kaj artikoloj el esperantista vivo,ekzemple pri la jam tradiciaj sovetiaj E-tendaroj kaj pri la malmulte konata disvolvo de la E-movado en Sovetunio.Por la ĉeĥa leganto interesa estas ekz.la mencio,ke en Vilnius oni emisiis novan filmon pri la litova poeto Maironis kun E-traduko de lia poemo"Jurate kaj Kastitis" fare de K.Naudzius kaj d-ro T.Pumpr.

La eldonintoj aperigas la bultenon kun forta espero,"ke ĝi helpos unuigi niajn penojn por planti ĉie amikecon kaj strebon ...al paco kaj pli bona vivo"./k/

---

REMEMORE AL GRANDA ESPERANTISTINO / daŭrigo de la 2-a paĝo/

peranto - kiam mi estis aktiva - mi entute ne vizitadis teatrojn kaj kinejojn kaj ĉiun liberan tempon mi fordonis al ĝi, instruante en kursoj /ĉiam senpage/,korektante hejmajn taskojn de miaj lernantoj kaj respondante ĝis 2-a aŭ 3-a horo matene milojn da leteroj,kiujn mi ricevadis, ĉar en miaj lernolibroj estis enpresita mia plena adreso..." Ekstreme intensa laboro por Esperanto estis verŝajne unu el kaŭzoj,kiuj elvokis gravan malsaniĝon kaj antaŭtempan emeritiĝon.

Laŭ mia opinio ne estis ankoraŭ objektive taksita merito de Julie Šupichová rilate al la nuna stato de Esperanto-movado en nia lando.Ni imagu nur,kian grandan informan laboron ŝi faris per siaj sennombraj gazet-artikoloj,gazet-kursoj kaj prelegoj. Kiom da novaj adeptoj kondukis ŝiaj lernolibroj en vicojn de esperantistoj !

Rerigardante la vivo-vojon de Julie Šupichová ni sentas profundan estimon al ŝia verko,kiu ĉiam estis inspirita de la plej puraj homaj idealoj.Forpasis nobla virino,sed ŝia granda ekzemplo restas antaŭ ni.

D-ro Vlastimil Novobilský

# Korespondi déziras

SOVETUNIO - anoj de la EK en Ivanovo,plejparte altlernejanoj inter 16-26 j.Komuna adreso : Ivanovo-12,Kolotilova 38-1,Leo Kazancev;

Nataša CHLEBNIKOVA,ul.13,Sanatornaja 7-19 • Tanja CIBINA,dtto • Tamara KORBUT,u.Mogilev-2, st.B-Čauskaj 6 • Larisa BUKOJAZOVA,u.Mogileva 21,st.Altajskaja 83 • Anatolij IVOLGIN,Krutičnaja 20a,1,Ivanovo-centr • Vladimir ANISIMOV,str.Žarova d 2/1,Ivanovo centr • Lida GROBOVA,Prospekt stroitelej 38-77,Ivanovo-38 • Olga KASATKINA,ul.Kobjakovskaja 6, 8,8 • Natalija PISKUNOVA,do vostr. • Jevgenij AMALIEV,u.Kinešma, str.Ribinskaja,d.57 • Sergej SMIRNOV,u.Kinešma,str.Krasnoflotskaja,d.10,ap.15,ambaŭ Ivanovsk-obl. • Leo TUMARKIN kaj Volodja KOLOBKOV,ambaŭ Ivanovo centr,do vostrebovanija.

JUGOSLAVIO - Inĝ.Branislav MILOŠEVIČ,19001 Zaječar,Krtska no 14/III,p.f.81.Serĉas amikojn por reciproka vizito • Vesna VASILIČ Kujaževac,str.10.oktobro 102,kun amikinoj 15-18 jaraj.

SVEDIO - 54j.laboristo kun esperantistinoj ,interŝanĝas fotojn kaj b.k. Runo MUR,poste restante,Göteborg 5/Södra vägen/.

NEDERLANDO - Michel ZUIDBERG, Veplo,Stalbergweg 255,interŝ.pm kun gejunuloj.

BRAZILO - Gilberto Pires FRANCO,Rua Mac-Niven 74,Nova Friburgo-E.do Rio.

ČSSR - Mineralojn interŝ.Alojz TENCER,Domov pracujících 1295/ 30,Karviná 6 • Membroj de EK "Bukedo" en Miletín,distr.Jičín serĉas amikojn el la tuta mondo. • Nova adreso : L.Chytil, Velká Dlážka 2792, Přerov.

ĈU LORENZ AŬ LORENC ? Konekse kun la artikolo"Antaŭ okdej jaroj.." en la pasinta n-ro de Starto ekestis diskuto koncerne ortografion de nomo de s-ano Lorenz.La origina nomo de tiu ĉi E-pioniro estis František Vladimír Lorenc.Depost transloĝiĝo al Brazilo li uzadis nomon Francisco Valdomiro Lorenz; tiun ĉi nomon enhavas ankaŭ libroj de li verkitaj.

Novobilský

SLOVAKAJN KANTOJN EN ESPERANTO prezentas muzika kvaropo ĉe Uzina Klubo Merina en Trenčín.Pli detale informos J.Lamačka, Pod Sokolicami 9,Trenčín,Slovakio.

PŘEDPLAŤTE SI P A C O !

ČES a jeho mírová sekce hodlají letos dále rozšířit řady čtenářů mezinárodního časopisu PACO,jehož čs. číslo je našim i zahraničním esperantistům dobře známo svou pestrostí a vysokou jazykovou úrovní.Očekává se,že v tomto roce se situace v tisku a distribuci časopisu výrazně zlepší.

Poznamenáváme,že s ohledem na vyšší náklady spojené s tiskem a zvýšené poštovné bylo nutné upravit částku ročního předplatného na Kčs 30. Přikládáme složenku ČES a doufáme,že včasnou úhradou předplatného se stanete odběratelem časopisu a současně i členem MEM.

Na dosavadní členy se obracíme se žádostí,aby této výzvy využili k získání dalších odběratelů,případně aby nám doporučili zájemce,jimž bychom mohli zaslat ukázkové číslo a složenku.

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio - vydává Český esperantský svaz,Praha 2,p.k.8 Aperas dufoje kvaronjare - vychází dvakrát čtvrtletně.Redakta komitato-redakční rada: ing. E.Felix,J.Mařík,ing.F.Sviták.Respondeca redaktoro-odpovědný redaktor O.Knichal.